



## Esperanto Rheinland-Pfalz

Johannes-Kirschweg-Strasse 11  
D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler

## Esperanto Rejnlando-Palatinato

### 56a cirkulero Esperanto-RLP (2-2014)

dato: 15/05/2014

#### Enhavo

1. Erste Mainzer Büchermesse
2. WeltBürgerFrühstück 2014
3. Franz-Georg Rossler prelegis en Blieskastel
4. 4a EMA denove en Rejnlando-Palatinato
5. Leserbriefe

#### 1. Erste Mainzer Büchermesse

D-ro Wolfgang Schwanzer kaj Thomas Frübis informas ke en Majenco okazos la Unuan Librofoiro :

Libra Foiro in Mainz,  
de la 16a ĝis la 20a majo,  
de la 9.30a ĝis 18.00 horo ĉiun tagon

La adreso estas

"Alte Lokhalle“, Mombacher Straße 78-80, Mainz.

La enira prezo estas 5,00 € tage.

Ĉirkaŭ 70 eldonejoj, vendejoj, liverantoj kaj produktantoj de libroj prezentas tutan gamon de la rejnland-palatinata libruma sceno, i.a. ankaŭ la libroservo de GEA „**Esperanto-Buchversand**“ ĉeestos kun propra stando.

#### 2. WeltBürgerFrühstück 2014

Das WeltBürgerFrühstück findet am Samstag, den 14.6.2014, auf dem Kornmarkt Trier statt. Esperanto-RLP wird wieder dabei sein. Wir suchen noch Leute, die unseren Stand mitbetreuen. Wer an diesem Samstag Zeit und Lust hat, melde sich bitte bei mir. Die Veranstaltung dauert von 10.00 Uhr bis ca. 15.00 Uhr.

#### 3. Franz-Georg Rossler prelegis en Becker-Meisberger-Institut Blieskastel



Jen la gazetara raporto de Oliver Walz: „Prelego pri la pola muziko en la mondo“.

En Sarlando la jaro 2014 estas la “Pola Jaro” laŭ la deklaro de la sarlanda registaro kaj en la palatinata urbo Zweibrücken okazos en junio granda jubilea festo pro la alveno de la pola reĝo Stanislaus Leszczyński al la bela urbo de la rozoj kaj ĉevaloj. Do, estis tre bona okazo inviti la samideanojn el la tuta regiono al la prelego de Franz

Georg Rossler el Speyer. Multaj homoj ŝatas danci la polonezon. Kelkaj ankoraŭ konas Frederikon Chopin kiel plej faman komponiston de Pollando. Ke la pola muziko multe transe de tiuj kliŝoj trovis agnoskon kaj ŝaton en la mondo, tion oni povis ekscii la 14an de aprilo en la Becker-Meisberger-instituto en Blieskastel. Prelegis la muzikisto Franz-Georg Rossler. Laŭ mazurko de Chopin li komence klarigis, el kio formiĝas la aparta sono de la pola muziko. Poste li montris, ke ankaŭ eksterlandaj komponistoj ne nur ŝatis ties "barbaran belecon", sed mem kreis abunde polstilajn verkojn.

Per diversaj muzikaj ekzemploj la aŭskultantoj eksciis, ke la sorto de Pollando sub la cara regno multe skuis ankaŭ la ceteran Eŭropon, ke volonte oni akceptis la fuĝintojn kaj honoris ilin per muzikaĵoj. En la dudeka jarcento polaj komponistoj unuavice kontribuis al la disvolviĝo de la aktuala muziko. Plej renomaj estis Lutoslawski kaj Penderecki.

Ankaŭ Esperanto rolas iom en la pola muzika kampo. Inter alie Antoni Grabowski esperantigis la operon "Halka" de Moniuszko. Andrzej Koszewski kreis imponan kantaton por du korusoj laŭ "La Espero" de L.L.Zamenhof, raraĵo auskultebla tiuvespere. Rikardo Ŝulco tradukis emociajn poemojn simpatiantajn kun la pola sorto sub la titolo "Kvin versaĵoj pri la Pola-Germana amikeco", kiuj trovis muzikan traktadon. Nelaste postrestas en la domo de la familio Becker-Meisberger multaj surbendigoj de esperantlingvaj elsendoj de Radio Varsovio, kiujn Gunter Becker tie akceptis kaj konservis. La polmuzika vespero povis okazi danke al tiuj mecenatoj, kiuj transformis sian posedaĵon en publikan klerigejon. Kaj dankinde estas la laboro de Oliver Walz, direktoro de la instituto, kiu bone informis la publikon, afable traktis la gastojn kaj profesie prizorgis la teknikan ekipaĵon. La fina muzikaĵo de Chopin, kvazaŭ senfine ripetebla, simbole aludis la daŭran kvaliton kaj la aprezon de la pola muziko.

Becker-Meisberger-Institut - Abtg. Pressedienst, Alter Hangarten 2, DE-66440 Blieskastel,  
Tel.: 06842-9295590, Mobil: 0151 250 96448, E-Mail: [info@becker-meisberger-instituto.org](mailto:info@becker-meisberger-instituto.org)

#### **4. 4a EMA denove en Rejnlando-Palatinato**

Ankaŭ la nunjara Esperantisto Migrado Aŭtuna (4a EMA) okazos en Zell ĉe Mozelo. Ni tranoktos kiel lastjare sur Marienburg. Kiel ĉi-jare la nombro de la partoprenantoj estas limigita je 30 personoj, do ne maltrafu la ĝustatempan aliĝon. Aliĝis jam 12 personoj. La 4-tagan programon vi trovas en la reto: <http://www.esperanto.de/gea/ehw2014.html>. Ni planas migri ĉiutage 10 ĝis 15 km kaj veturoj per trajno kaj ŝipo. Jen kelkaj interesaj celoj: Bernkasel-Kues, Beilstein, vingustumado apud Kalmit, burgo Eltz.

#### **5. Leserbriefe**

Dr. Christoph Klawe aus Trier konnte einen Leserbrief in der Badischen Zeitung platzieren. Hier der Link dazu : <http://www.badische-zeitung.de/leserbriefe-68/er-engagierte-sich-fuer-die-sprache-esperanto--83153663.html>

Einige Tage vorher hatte die Süddeutsche Zeitung einen anderen Leserbrief von ihm gedruckt. Hier ist er :

##### **Esperanto – wie im Paradies**

Mit großem Interesse habe ich den SZ- Artikel über das derzeit viel diskutierte Übersetzungsproblem in der Europäischen Union gelesen („In German, please“, 29./30. März). Die Einigung auf Englisch als einziger Verkehrssprache ist naheliegend. Allerdings ist Englisch in Wahrheit so schwierig, dass nur wenige am Ende systematischen Lernens ein Sprachniveau erreichen, wie es beispiels-

weise für das Level C2 im Gemeinsamen Europäischen Referenzrahmen für Sprachen gefordert wird (nur ein solches Level wäre für EU-Parlamentarier akzeptabel). Die Auswahl von Englisch würde darüber hinaus eine erhebliche Asymmetrie schaffen. Dabei gibt es die Lösung für das Sprachproblem in der EU schon längst: Esperanto. Dieser Vorschlag wird nur aus mangelnder Informiertheit reflexartig belächelt. Von der reichhaltigen Kulturgeschichte des Esperanto konnte eine Ausstellung in der Bayerischen Staatsbibliothek 2012 einen guten Eindruck vermitteln („Kunstsprachen für die globalisierte Welt“, 15.6.-9.9.2012). Esperanto hat eine klare

Grammatik und greift auf den Wortschatz vieler europäischer Sprachen zurück. Durch die Arbeiten unter anderem von Helmar Frank im „Paderborner Modell“ konnte wissenschaftlich stichhaltig gezeigt werden, dass hohe Sprachkompetenz in Esperanto leichter zu erreichen ist als in Nationalsprachen. Die Gemeinschaft der Esperanto-Sprecher ist weltweit außerordentlich lebendig, es gibt hoch professionell arbeitende Organisationen spezialisierter Sprachlehrer, die schnell einen effizienten Unterricht sicherstellen könnten. Inoffiziell ist der Gebrauch von Esperanto schon akzeptiert. So gibt es regelmäßige Stammtische der Esperanto-sprechenden Dolmetscher an verschiedenen EU-Standorten. Für einen Franzosen, der sich als Übersetzer auf Ungarisch und Litauisch spezialisiert hat, fühlt sich der Gebrauch von Esperanto an wie der Aufenthalt in einem sonnigen Ferienparadies.

*Dr. Christoph Klawe  
Internationales Esperanto-Institut  
Den Haag /Niederlande*

Deutscher Esperanto-Bund e.V.  
Landa Ligo Rejnlando-Palatinato  
Esperanto-RLP  
p.a. Wolfgang Bohr  
Johannes-Kirschweng-Straße 11  
**D-53474 Bad Neuenahr-Ahrweiler**  
**Germanujo**  
retpoŝto: [wolfgang.bohr@esperanto.de](mailto:wolfgang.bohr@esperanto.de)